nia voĉo

madrida esperanto-liceo majo 2012

## TRIDEKO DA MADRIDANOJ PARTOPRENIS LA HISPANAN KONGRESON

Ĉirkaŭ tridek madridaj esperantistoj partoprenis la 71-an Hispanan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Almagro (Ciudad Real) inter la 27a de aprilo kaj la 1a de majo, kun aldona postkongreso la 2-an, kiun madridanoj povis partopreni pro la tiudata regiona festo.

La kongreso enhavis gravajn kaj sukcesajn kulturajn erojn. Menciindas la memorado pri la 20-jariĝo de la Ibera Skolo aŭ Ibera Grupo de literaturo en Esperanto, kun partopreno de diversaj ties membroj, inter kiuj madridanoj Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj Ana Manero.

Omaĝo al la teatro, sub la nomo ***Vivu la teatro!*** havis lokon en la impona Municipa Teatro de Almagro, sub la direktado de Miguel Fernández. Specialan rolon montris la madrida aktorino Laura Pascual, kun sia spektaklo pri *La patrino ĉe Lorca*, surbaze de tekstoj el *Sanga nupto* de Federico García Lorca.

Dum la inaŭguro kantis la madrida *Kvaropo Sinkopo*. Publike ludis lunde la katalunia grupo *Kaj Tiel Plu*, en mirinda koncerto, kies amasan ĉeeston bedaŭrinde malhelpis tiuvespera frosta vetero.

Prezentiĝis tri filmoj, inter kiuj du pri la Esperanto-movado mem: *La universala lingvo* kaj *Esperanto*, tiu ĉi lasta mendita de la Eldona Kooperativo de SAT. Plej surpriza por multaj estis filmo *Stranga nupto*, amatora eksperimento pretigita ĉ. la jaro 1980 en la malnova sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, kaj poste preskaŭ forgesita, kun almodovareskaj trajtoj.

Ankaŭ prezentiĝis diversaj libroj, el kiuj elstaras la nova eldono de la lernometodo de Miguel Gutiérrez Adúriz, plus libro de mikronoveloj de la sama aŭtoro, *Ne ekzistas verdaj steloj*, kaj traduko fare de la sama aŭtoro de novelaro *Ombroj sur verda pejzaĝo* de la kantabra verkisto Manuel Llano.

El turisma vidpunkto reliefigindas la gvidata vizito al la urbo mem, kiun sinsekve mirinde interpretis Jorge Camacho. La lundon okazis ekskurso al Campo de Criptana, kie oni vizitis la famajn ventmuelejojn kaj tradician vinkelon. Kiel menciite, la 2-an de majo okazis postkongreso, kun vizito al la natura parko Tablas de Daimiel.

Kompreneble, ne mankis prelegoj, kunvenoj, diskutoj, kaj ĉefe babilado kaj amuziĝo en tre malstreĉa kaj ĝuinda etoso.

## VIZITO AL NACIA BIBLIOTEKO

Kiel ni informis en pasinta numero, okaze de la 125-jariĝo de Esperanto, la Nacia Biblioteko de Hispanio organizis bibliografian ekspozicion pri Esperanto, okupantan la kvar vitroŝrankojn situantajn inter la halo de la Biblioteko kaj la ĉambreto kiu donas eniron al la ĉefa lego-salono, kaj kiu daŭros ankoraŭ dum la monato majo.

Okaze de la ekspozicio, MEL organizis kolektivan viziton por esperantistoj la 8-an de majo je la 5a horo vespere.

Ĝi ne havos kiel ĉefan celon nur la ekspozicion pri Esperanto, sed la kutiman itineron ene de la biblioteko kun montrado de la plej interesaj lokoj kaj kelkaj el la ĵuveloj konservataj tie. Tamen, ĝi faciligos la eniron por vidi la esperantaĵojn, ĉar ili troviĝas en la interna parto. Ĉiel ajn, jam ene, eblus eventuale iom pli longe ol kutime halti en tiu ekspoziciejo. Eĉ sen la verda kialo, la vizito estus per si mem interesa.

Partoprenantoj kolektiĝos ĉ la 16,50 horo en la eniro al la Biblioteko mem. Post la vizito, oni planas kunveni en proksima drinkejo, kien povos aliri aliaj esperantistoj kiuj ne povis aŭ emis viziti la Bibliotekon. Estis proponita la bierejo Finnegans, en placo de la Salesas, je la 18,30, kie jam antaŭe okazis babilrondoj de Esperanto.

## MADRIDA SOCIA FORUMO

Ene de la Madrida Socia Forumo (MSF) kiu okazos inter la 19a kaj 20a de majo 2012, ties Organiza Asembleo akceptis la proponon de SATeH por gvidi programeron sabate la 19an. Temos pri tiel nomata *ateliero* pri "Lingva Demokratio, la problemo de Babel: Pere de kiu lingvo ni interkomunikos?". La ateliero mem konsistiĝos en debato, gvidata de kelkaj SATeH-anoj daŭranta maksimume 1 horon kaj duonon.

La gvidantoj devos prezenti la problemon laŭ speciala maniero propra de la MSF, do, unue estos dekminuta enkonduko de la SATeH-gvidanto(j) klarigante la kaŭzojn kaj konsekvencojn laŭ ia "arbo de la vivo" (kiu estos teksaĵo en kiu oni ligos ĉiujn atelierojn) kaj poste estos la debato por proponi/trovi solvojn/alternativojn; kompreneble SATeH prezentos unue la "esperantan solvon", sed ni devos esperi, ke estos multaj skeptikuloj kaj eble oni proponos aliajn solvojn, do la gvidantoj devos moderi la debaton kaj respekti la finan decidon de la "ateliera asembleo" rilate al la finaj solvoj atingotaj.

La horaro de la ateliero ankoraŭ ne estas fiksata: povas esti matene ja la 11:00, 12:30, aŭ vespere je la 16:00, kaj la loko momente estos en la Parko "El Retiro" subĉiele (la MSF volas fari ĝin tiel pro la influo de la 15M-movado, ĉio surstrate), sed se la vetero ne permesas tion estos alternativaj ejoj (tre eble iu socia centro). La ideo estas fari je la fino de la MSF unu grandan asembleon por eldiri la konkludojn de la atelieroj.

La partopreno estas malferma al ĉiu esperantisto kaj al ĉiu preterpasanto.

## EKSPOZICIO KAJ PRELEGOJ EN USERA

Esperanto trovis lokon en "Kultura Semajno" organizota de la "Asociación de Vecinos del Barrio de Zofío" (kvartalo Usera), kunlabore kun aliaj instancoj el la kvartalo kiu okazos inter venontaj 6a kaj 13a junio.

Muntiĝos ekspozicio de la paneloj de HEF pri Esperanto en la gimnazio "IES Pradolongo" dum la tuta semajno, kaj ankaŭ estas antaŭvidataj du prelegoj, unu pri Esperanto, kaj la alia ne esperanta, sed rilata, pri Lorca aŭ Miguel Hernández fare de Miguel Fernández. Ili okazos ankaŭ en la sama loko vespere, sed la datoj ankoraŭ ne estis fiksataj. Atentu venontan numeron de Nia Voĉo kaj ankaŭ la informojn en la retaj forumoj kaj en nia retejo.

## VIZITIS NIN

Aŭstralia samideano Daniel Kane vizitas nun Hispanion dum kelkaj semajnoj. Li akompanis nin en la sidejo de Liceo la 16-an de aprilo, kaj ankaŭ partoprenis la Hispanan Kongreson en Almagro. Li restos en Madrido ankaŭ dum la unuaj tagoj de majo.

## MADRIDA PROGRAMO

La kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la grupo.

Novaĵoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ aŭ en la forumo http://esperanto.creatuforo.com/

Pri la kursoj: http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com